



# IRANA ESPERANTISTO

IREA  
Irano Esperanto-Asocio

# پايم سبراندیشان

Kultura sezon-revuo en la persa kaj Esperanto  
N-ro: 34, Dua Serio, Somero 2020

فصلنامه‌ی فرهنگی دوزبانه‌ی فارسی و اسپرانتو  
شماره ۳۴، دوره دوم، تابستان ۱۳۹۹

# IRANA ESPERANTISTO

Pajam-e Sabzandiŝan  
(Mesaĝo de Verd-ideanoj)  
ISSN 1728-6174

IRANA ESPERANTISTO  
Kultura kaj sendependa sezon-revuo internacia  
Dua serio, N-ro 34, Somero 2020

Bonvenas eseoj, artikoloj, raportoj kaj kontribuoj kondiĉe ke ili ne estu publikigitaj antaŭe. Bonvenas kultur-temaj kontribuoj ĉu en Esperanto ĉu en la persa.

\*\*\*

Ĉia presa aŭ elektronika citado aŭ eldonado de materialoj de IRANA ESPERANTISTO, ĉu originale ĉu tradukite en aliajn lingvojn, estas permesata. Bonvole menciu pri la fonto kaj la originala lingvo (t.e. Esperanto aŭ la persa) kaj se eble, informu nin pri eldonaĵo en kiu aperis io de aŭ pri IRANA ESPERANTISTO aŭ/kaj sendu ciferecan kopion al ni.

به نام خداوند جان و خرد

# سبزاندیشان

فصلنامه‌ی پژوهشی - فرهنگی دوزبانه‌ی فارسی و اسپرانتو

دوره دوم، شماره سی و چهارم، تابستان ۱۳۹۹  
شماره استاندارد بین‌المللی (ISSN):  
۱۷۲۸-۶۱۷۴

تاریخ انتشار نخستین شماره: پاییز ۱۳۸۱

نقل مطالب مجله با ذکر منبع و ماخذ جایز است و از استفاده کنندگان درخواست می‌شود یک نسخه الکترونیکی یا تصویر از نشریه‌ی را که در آن مطلبی به نقل از این مجله درج شده است به نشانی اینترنتی مجله ارسال کنند.

مسئولیت مطالب مندرج در این مجله برعهده‌ی نویسندگان آن می‌باشد.

گرافیک و حروفچینی: سبزاندیشان

نشانی‌ها:

پایگاه اینترنتی: [www.espero.ir](http://www.espero.ir)

پست الکترونیک: [info@espero.ir](mailto:info@espero.ir)

## همکاران تحریریه این شماره:

- \* منیره فهمی
- \* احمدرضا ممدوحی
- \* نیره ابراهیم‌پور
- \* امیر فکری
- \* صلاح محمدپور
- \* کیهان صیادپور
- \* نازی صولت
- \* حمزه شفیعی

## Mallongigoj uzitaj en ĉi tiu numero

ILEK: Irana Literatura Esperanto Konkurso  
 IREA: Irana Esperanto-Asocio  
 IREJO: Irana Esperantista Junulara Organizo  
 IREK: Irana Esperanto-Kongreso  
 IRLEI: Irana Ligo de Esperantistaj Instruistoj  
 UK: Universala Kongreso

Irana Esperantisto  
akceptas anoncojn.

مجله سبزاندیشان آماده پذیرش آگهی می‌باشد.

## Kontribuantoj ĉi-numere:

- \* Najjere Ebrahimpur
- \* Ahmad Reza Mamduhi
- \* Monire Fahmi
- \* Slah Mohammadpur
- \* Keyhan Sayadpour
- \* Nazi Solat
- \* Hamzeh Shafiee
- \* Amir Fekri



## Kovrila Paĝo:

50-a numero de "Irana Esperantisto"  
Desegnita: Mahmud Mirbozorgi

## Lasta Paĝo:

De: Keyhan Sayadpour

## طرح روی جلد:

پنجاهمین شماره مجله سبزاندیشان  
طرح از: محمود میربزرگی

## طرح پشت جلد:

طرح و شعر از کیهان صیادپور



Ĉi liveru la manojn!  
 Sed tio ne signifas!  
 Ĉi liveru la manojn!  
 Ĉi povas alimentari!  
 Ĉi liveru la vivojn!  
 Ĉi vivu alimentara!  
 Keyhan Sayadpour

# En ĉi tiu numero:

در این شماره:

Paĝo

- 4 Antaŭ ĉio..
- 5 Novaĵoj
- 6 IREA plenforte antaŭen...
- 7 MondaFest'2020 Statistikoj
- 8 Diskuto kun kronviruso  
Poemo de Keyhan Sayadpour
- 9 Blanko kaj Nigro  
Fabelo de Voltaire en Esperanto
- 16 La sekreto de interna trankvileco  
Esperantigis: M. Fahmi
- 18 IREA Okazigis...  
Programeroj okazitaj de IREA
- 20 Aŭŝvica Tatuisto  
Libro-prezento
- 22 Intervjuo  
Intervjuo kun Najjere Ebrahimpour (Lumina)
- 24 Diversaĵoj  
Amir Fekri
- 26 Elia, nova skribo por blinduloj  
Slah Mohammadpur
- 29 Mi, Subskribita...  
Andre Cherpillod
- 30 Aventuroj de Pioniro (11)  
Tradukis al la persa: A. Fekri



صفحه

- 4 قبل از هر چیز ...
- 5 اخبار
- 6 انجمن اسپرانتو، با توان رو به جلو...
- 7 آمار شرکت کنندگان جشنواره جهانی
- 8 گفت‌وگو با ویروس کرونا  
شعر از کیهان صیادپور
- 9 سیاه و سفید  
داستانی از ولتر به اسپرانتو
- 16 راز آرامش درونی  
ترجمه به اسپرانتو: منیره فهمی
- 18 انجمن اسپرانتو برگزار کرد...  
معرفی برنامه‌های اجرا شده توسط سبزاندیشان در محیط زوم
- 20 خال کوب آشویتس  
معرفی کتاب از نیره ابراهیم‌پور
- 22 مصاحبه  
گفت‌وگو با نیره ابراهیم‌پور
- 24 گوناگون  
امیر فکری
- 26 ایای سنتی/سپیدخوان فارسی  
صلاح محمدپور
- 29 من، امضاکننده...  
مقاله‌ای از آندره چرپیلود
- 30 ماجراهای یک پیشتاز (۱۱)  
ترجمه: امیر فکری

## Antaŭ ĉio...

Via revuo, Irana Esperantisto, 18 jariĝis. Tiu ĉi numero estas la 50a sinsekva numero de la revuo. La kovrilbildo spegulas parton de niaj klopodoj por atingi tiun ĉi jubilean numeron. Fakte dum la pasintaj 18 jaroj, multaj helpis kaj kontribuis en aperigo de la revuo. Ili ja senmortigis siajn nomojn sur la paĝoj de la revuo por ke en estonteco ĉiuj sciu pri la penoj kaj atingoj de personoj kiuj sindediĉe donis tempon kaj energion por ke la revuo daŭre publikiĝu. Tiel ni kaj ili konstruis ponton inter la esperantistoj de kuranta kaj estonta generacioj.

Mi kore gratulas la 18-jariĝon de la revuo al ĉiuj karaj kontribuantoj kaj legantoj. Okaze de tiu ĉi jubilea numero, mi denove invitas vin al kontribuo kaj helpo por ke la revuo estu pli riĉ-enhava kaj alloga.

Laŭ la decido de IREA-komitato, (re)membriĝo al la asocio por la kuranta jaro estas senpaga. Tiu decido realiĝis pro la granda helpo de s-ino Faraĝi al la asocio. Ni invitas vin utiligi tiun ĉi oportunon por plifortigi IREA-n.


Via, Hamzeh Shafiee

## قبل از هر چیز...

پنجاهمین مجلد از سیزاندیشان را حضورتان تقدیم می‌کنیم، شانزده مجلد در دوره اول و ۳۴ عدد در دوره دوم. این شماره همانطور که از طرح روی جلد آن مشخص است برای همه ما نشانه مهمی است از تداوم و تلاش برای نشر آنچه در توانمان بوده تا پلی باشیم برای ارتباط بین اسپرانتودانان و اسپرانتودوستان داخل و خارج. این تریبون که اکنون در آستانه هجده‌سالگی‌اش در واقع بلوغ خود را نیز جشن می‌گیرد سعی دارد تا همچنان راهی را که در پیش گرفته ادامه دهد و علیرغم همه مشکلات و احیاناً کم‌توجهی‌ها و کم‌لطفی‌ها در حقش، یادگاری باشد برای اسپرانتودانان نسل آینده که در لابلای سطور آن بتوانند از حال و روز جنبش اسپرانتو در این روزها و ایام پرتلاطم کسب اطلاع نمایند. تقارن هجده سالگی مجله و انتشار پنجاهمین شماره سیزاندیشان را حضور همه خوانندگان مجله تبریک گفته و یک بار دیگر برای بالاتر بردن کیفی و کمی محتوای مجله دست یاری آنان را می‌طلبیم.

در این پنجاهمین شماره لازم می‌دانم از همه کسانی که در مقاطع مختلف برای انتشار مجله همکاری و مساعدت نموده‌اند تشکر و قدردانی نمایم. اسامی این افراد در صفحه ۲ هر شماره از مجله نقش بسته و نیازی به ذکر مجدد نام آنان در این فضای محدود نیست. البته در کنار این اسامی، اعضای گروه تلگرامی مجله که همگی در امر تهیه مطالب و بازبینی نهایی قبل از انتشار کمک و همیاری می‌نمایند نیز شایسته تقدیر و سپاس هستند.

ارادتمند، حمزه شفیعی



Iun oni demandis: “Al kiu similas sciencisto sen praktiko?”

Li respondis: “Al abelo sen mielo.”

Ordonu tiun senutilan abelon:

“Ne piku kiam vi ne donas mielon!”

“La Florejo”, Sadio  
Tradukis: Keyhan Sayadpour

## از فارسی به اسپرانتو از اسپرانتو به همه زبان‌ها



## به مناسبت خبر ترجمه دو داستان ایرانی از اسپرانتو به زبان مجاری

تیبور سابادی (Szabadi Tibor J)

نویسنده و مترجم اهل مجارستان اخیراً طی ایمیلی خبر دادند که دو داستان کوتاه ایرانی به نام‌های "پس از شیما" اثر دکتر شیرین احمدنیا و "سوغات" اثر محبوبه میرقدیری را از زبان اسپرانتو به زبان مجاری ترجمه کرده‌اند. آقای سابادی از مترجمان پرکار مجارستان هستند که بیش از ۱۷۰ اثر از کشورها و فرهنگ‌های گوناگون را که به زبان اسپرانتو منتشر شده‌اند را به زبان مجاری برگردان نموده و بدین وسیله مجارزبانان را با فرهنگ‌های سایر ملل جهان آشنا می‌نمایند.

محبوبه میرقدیری دبیر بازنشسته دبیرستان‌های اراک، نویسنده‌ای صاحب سبک و شناخته شده است که نخستین مجموعه داستانی او به نام «شناس»، کاندیدای کتاب سال ۱۳۷۹ شد. داستان کوتاه «سوغات» نخستین داستان از کتاب «شناس» است که توسط سرکار خانم نازی صولت، رئیس سابق انجمن اسپرانتو، ترجمه و در بسیاری از سایت‌های ادبی منتشر شده است.

خانم دکتر شیرین احمدنیا نیز از اسپرانتودانان پرکار و با سابقه هستند که تاکنون آثار متعددی از ایشان در مجله «پیام سبزاندیشان» درج شده است. داستان «پس از شیما» را می‌توانید در شماره ششم از دوره اول (منتشر شده در زمستان ۱۳۸۲) و داستان «سوغات» را در سایت فرهنگسرای اسپرانتو در ایران به این آدرس بخوانید: <http://kulturo.ir/?p=436>



خانم میرقدیری (سمت چپ) همراه با خانم صولت (مترجم اسپرانتوی داستان «سوغات») در سومین کنگره اسپرانتوی ایران



خانم دکتر شیرین احمدنیا در حال صحبت با خانم دکتر زهرا کریمی در حاشیه نخستین کنگره اسپرانتوی ایران



آقای تیبور سابادی، مترجم فعال در زمینه ترجمه آثار ملل مختلف از اسپرانتو به زبان مجاری و از مجاری به اسپرانتو

## گزارش ۲۱مین کنگره بین‌المللی پزشکی اسپرانتو دکتر کیهان صیادپور

این همایش قرار بود در شهر Hodmezovasarhely مجارستان برگزار شود که به علت شرایط پاندمی مثل خیلی همایش‌ها مجازی شد. برای من که به علل متعدد شانس شرکت در این همایش‌ها را نداشتم فرصت خوبی پیش آمد. موضوع اصلی همایش هم عفونت با کورونایروس جدید یا کووید شد. با دو مقاله علمی با عناوین "تظاهرات قلبی کووید" و "معرفی بیماران کووید من" در همایش شرکت کردم. ۲۰ سخنرانی علمی طی ۱۰ ساعت همایش (به جز افتتاحیه و اختتامیه) در روزهای ۱۷ و ۱۸ ژوئیه همایش را پربار کردند. زبان‌های همایش اسپرانتو و انگلیسی بودند. برای من تجربه جالبی بود. پس از حدود ۳۵ سال اسپرانتودان بودن و استفاده‌های مختلف

از آن، و سخنرانی‌های پزشکی متعدد به فارسی و انگلیسی، ارائه سخنرانی علمی برای پزشکان به زبان اسپرانتو برای اولین بار لذتبخش بود. علاوه بر دو سخنرانی، افتخار گرداندن یک جلسه از کنگره و عضویت در گروه داوران انتخاب بهترین محقق جوان کنگره را داشتم.



## مقاله علمی دکتر صیادپور در مجله Medicina Internacia Revuo


"Medicina Internacia Revuo" (مجله بین‌المللی پزشکی)، یک ژورنال معتبر بین‌المللی در زمینه پزشکی است که از سال ۱۹۲۳ توسط انجمن جهانی پزشکی اسپرانتو منتشر می‌شود. در آخرین شماره این نشریه (شماره ۱۱۴، انتشار سپتامبر ۲۰۲۰) مقاله علمی دکتر کیهان صیادپور به زبان انگلیسی و با خلاصه اسپرانتو در هشت صفحه منتشر شده است. این دستاورد مهم را به دکتر صیادپور و همکاران ایشان و نیز جامعه اسپرانتودانان ایران صمیمانه تبریک می‌گوییم.

آخرین شماره این مجله و همچنین شماره‌های گذشته از سایت رسمی آن به آدرس زیر قابل دریافت هستند:

<https://interrev.com/mir/index.php/mir>

# IREA

## Plenforte antaŭen al novaj atingoj



Irana Esperanto-Asocio komencis novan etapon da agadoj tuj post la okazigo de sia 7-a landa kongreso. Laŭ la iniciato de nia kara samideano, s-ro Mamduhi, kiu dediĉis sian plentempon al plifortigo kaj pliriĉigo de niaj agoj, ni komencis plani kaj okazigi diversajn programojn en nia Zoom-spaco. La Zoom-konto estas pagita konto kaj do, senlima unujara ebleco por okazigi diversajn programojn. Ni dediĉis la konton al la tuto de niaj samideanoj por disvastigo kaj diskonigo de diversaj agoj kaj eblecoj. Inter la programoj estis intervjuoj, prelegoj, poem-deklamado, origami-kursoj kaj aliaj programoj. Kadre de MondaFest' 2020 okazis tagoj ankaŭ programoj kiujn spektis pli ol mil personoj kaj en Zoom kaj en Jutubo. La malhel-ruĝa parto en la supra mapo de la mondo montras la regionoj kiuj okazigis siajn tagojn en nia Zoom-spaco, nome Tago de Eŭropo, Mez-orienta kaj Nord-afrika Tago (MONAT) kaj Tago de Afriko.

Jen la listo de programoj kiuj estis reklamitaj en Eventa Servo. Certe ni ankaŭ okazigis programojn kiuj ne estis anoncita en Eventa Servo.

- 20 sep: Origamio kaj Esperanto: ĉu eblas dialogo kaj kunlaboro? Ateliero -6. Origamio en pedagogio. Prelegeto kaj faldado de origamiaj fabeloj.
- 20 sep: IKEF-Kunsido
- 13 sep: Origamio kaj Esperanto: ĉu eblas dialogo kaj kunlaboro? Ateliero kaj prelegetoj pri origamio de Larysa Osadchuk (Asocio "Animado Kreado Kulturo Origamio")
- 7 sep: Kadre de MondaFest' 2020, "Kunpens(ig)ado: Esperanto kaj Universitatoj" (La 7-a sesio)
- 6 sep: Origamio kaj Esperanto: ĉu eblas dialogo kaj kunlaboro? Ateliero kaj prelegetoj pri origamio de Larysa Osadchuk (Asocio "Animado Kreado Kulturo Origamio")
- 1 sep: Prof. Francesco Maurelli Prezentas Esperanton por la Ekstera Publika
- 30 aŭg: Origamio kaj Esperanto: ĉu eblas dialogo kaj kunlaboro? (Ateliero kaj prelegetoj pri origamio de Larysa Osadchuk, Asocio "Animado Kreado Kulturo Origamio")
- 24 aŭg: Kadre de MondaFest' 2020, "Kunpens(ig)ado: Esperanto kaj Universitatoj" (La 6-a sesio)
- 23 aŭg: Origamio kaj Esperanto: ĉu eblas dialogo kaj kunlaboro? Ateliero-2 de Larysa Osadchuk (Asocio "Animado Kreado Kulturo Origamio")
- 16 aŭg: Origamio kaj Esperanto: ĉu eblas dialogo kaj kunlaboro? (Ateliero kaj prelegetoj pri origamio de Larysa Osadchuk, Asocio "Animado Kreado Kulturo Origamio")
- 10 aŭg: Kadre de MondaFest' 2020, "Kunpens(ig)ado: Esperanto kaj Universitatoj" (La 5-a sesio)
- 20 jul: Kadre de MondaFest' 2020, "Kunpens(ig)ado: Esperanto kaj Universitatoj" (La 4-a sesio)
- 19 jul: Poem-deklamado
- 19 jul: Viva Intervjuo kun d-ro Renato Corsetti
- 18 jul: Viva Intervjuo kun Heidi Goes
- 15 jul: "Homo nutriĝas tra oreloj!"-La 5-a sesio
- 12 jul: Viva Intervjuo kun d-ro Renato Corsetti
- 10 jul: Poem-deklamado
- 8 jul: "Homo nutriĝas tra oreloj!"-La 4-a sesio
- 6 jul: "Kunpens(ig)ado: Esperanto kaj Universitatoj" (La 3-a sesio)
- 5 jul: Viva Intervjuo kun d-ro Renato Corsetti
- 4 jul: Prezento kaj instruado de Esperanto en la sŭahila lingvo
- 1 jul: "Homo nutriĝas tra oreloj!"-La 3-a sesio
- 30 jun: Poem-deklamado
- 27 jun: Prezento kaj instruado de Esperanto en la svahila lingvo
- 24 jun: "Homo nutriĝas tra oreloj!"-La 2-a sesio
- 23 jun: Prelego de s-ino Mireille Grosjean (Mirejo Groĵan)
- 22 jun: "Kunpens(ig)ado: Esperanto kaj Universitatoj" (La 2-a sesio)
- 21 jun: Viva Intervjuo kun d-ro Renato Corsetti
- 20 jun: Prezento kaj instruado de Esperanto en la svahila lingvo
- 17 jun: "Homo nutriĝas tra oreloj!"
- 16 jun: Prelego de s-ino Mireille Grosjean (Mirejo Groĵan)
- 14 jun: Viva Intervjuo kun d-ro Renato Corsetti
- 13 jun: Poem-deklamado
- 9 jun: Prelego de s-ino Mirejo Groĵan
- 8 jun: "Kunpens(ig)ado: Esperanto kaj Universitatoj"
- 7 jun: Viva Intervjuo kun d-ro Renato Corsetti
- 2 jun: Prelego de s-ino Mirejo Groĵan
- 31 maj: Intervjuo kun d-ro Renato Corsetti (kvara parto)
- 25 maj: Prelego de s-ino Mirejo Groĵan
- 24 maj: Intervjuo kun d-ro Renato Corsetti (tria parto)
- 17 maj: Intervjuo kun d-ro Renato Corsetti (dua parto)
- 10 maj: Intervjuo kun d-ro Renato Corsetti
- 16 apr: 7-a Irana Esperanto Kongreso (IREK-7)



**MONDAFEST'2020**  
LA MONDA FESTIVALO DE ESPERANTO  
20 JUNIO - 20 SEPTEMBRO



VIRTUALA KONGRESO  
DE ESPERANTO

هرچند امسال عدم برگزاری کنگره جهانی که قرار بود در کشور کانادا برگزار شود، حسرت دیدار دوستان و هم‌آرمانان را به دل خیلی‌ها گذاشت، اما در عوض با برگزاری جشن جهانی اسپرانتو این امکان فراهم شد تا کسانی که به دلایل مختلف قادر به شرکت حضوری در کنگره نبودند بتوانند از لذت شرکت در این جشن و استفاده از برنامه‌های متنوع آن بهره‌مند شوند. گزارشی که از آمار شرکت‌کنندگان در مراسم افتتاحیه جشن جهانی اسپرانتو در زیر ارائه شده است، گویای استقبال گسترده جامعه اسپرانتودانان است.

## آمار شرکت‌کنندگان جشن جهانی اسپرانتو

بیستم ژوئن ۲۰۲۰ (سی و یکم خرداد ۱۳۹۹) در ساعت بین‌المللی ۱۲، سازمان جهانی اسپرانتو (UEA)، مراسم گشایش جشنواره جهانی اسپرانتو را آغاز کرد. این مراسم که دو ساعت و نیم طول کشید، به روش‌های مختلفی که به آگاهی همگان رسیده بود، قابل مشاهده زنده بود.

سخنرانان اصلی مراسم، عبارت بودند از:

رئیس UEA (دانکن چارترز)، یکی از اعضای خانواده زامنهوف (مارگارت زالسکی زامنهوف)، گروه کاری اسپرانتو برای سازمان ملل با همکاری UEA و TEJO (همفتری تونکین، سارا سپانو)، مسئول کارهای فرهنگی و کنگره‌ها در هیات مدیره UEA (اورلاندو رایول) و مسئول امور آفریقایی در UEA (یرمی سایبومو).

مراسم گشایش با برنامه‌های موسیقی گوناگون و با همکاری Fransozo, Kriztoff, jOmO, Manno Montanna, Joel و Muhire و خواندن سرود "امید" به وسیله Amira Chun، نیز همراه بود.

پخش زنده مراسم از سه راه کانال یوتیوب UEAviva، صفحه فیسبوک UEA و MondaFest.net قابل مشاهده و پیگیری بود. از صفحه فیسبوک، ۶۰۰۰ نفر استفاده کردند که از این تعداد، ۲۰۰۰ نفر به طور فعال با فرستادن پیام و لایک (علامت دوست داشتن)، نظر مثبت خود را نشان دادند.

در یوتیوب، ۶۰۰ نفر به طور زنده مراسم را پیگیری کردند؛ برخی به صورت خانوادگی و برخی همراه با شاگردان خود. کاربران اینترنت را نمی‌توان شمرد، ولی می‌توان گفت که بیش از ۲۳۰۰ نفر، آنرا دنبال کردند. نتیجه بسیار مثبتی بود!

نکته‌های عجیب‌آور، مشاهده پیگیری اسپرانتیست‌ها، تا یک روز پس از مراسم بود؛ در مدت ۲۴ ساعت بعد از مراسم گشایش، بیش از ۱۷۰۰ بار، مراسم از راه UEAviva دیده شد و ویدیوی مراسم، به رده دومین فیلم پربیننده کانال، طی پنج سال گذشته دست یافت. تعداد مشترکین نیز، بیش از ۱۲۰۰ نفر افزایش پیدا کرد.

در فیسبوک، فیلم مراسم گشایش را ۱۱۰۰۰ نفر بیش از ۳۱۰۰ بار مشاهده کردند و تعداد مشترکین صفحه، به ۷۶۰۰ نفر رسید.

منبع: [https://revuoesperanto.org/mondafest\\_ciferoj](https://revuoesperanto.org/mondafest_ciferoj)

ترجمه: نازی صولت

# Diskuto kun Kronviruso

*Mi diris al la viruso de krono:  
“Kial vi ne sidas sur via trono?  
Homojn en la mond’ amase vi bučas,  
Forton de medicinistoj vi sučas.  
Pli sangelverŝa ol pest’ kaj ĥolero,  
Pli kruela ol Ĝingis’ kaj Hitlero.  
Pro tiuj turmentoj, ĉu vi ne hontas?  
Ho la monstro! El kie vi ja fontas?”  
Respondis al mi la organismeto:  
“Atentu min homo! Jen mia peto:  
Legu historion! Ĉiu pli ol mi,  
mortigis homojn dum sia pandemi’.  
Mi bonkoras, kaj infanojn delasas,  
Junuloj malofte pro mi forpasas.  
Maljunajn kaj malsanajn mi ja ŝatas,  
Fortajn kaj sanajn mi malofte batas.  
Riĉan de malriĉa mi ne distingas,  
Kronviruso eĉ kronulojn atingas.”  
Mi diris: “Ĉu ili ne estas homoj?  
Ĉu maljunaj homoj estas fantomoj?  
Kiun kulpon malsanuloj ja faris,  
pro tio en mort-vico ili staris?”  
Aranĝante la kronon, ĝi respondis:  
“Ĉu vi al zorg-hejm’ la avon ne sendis?  
Kaj lin ne atentis, kiam li plendis.  
Vi faris tion por komforta vojaĝ’,  
Sen-konsidere pri liaj sent’ kaj aĝ’.*

*Kaj por la enterigo vi ne pagis,  
Ĉu senpagan forpason vi imagis?  
Nun estas nek la av’ nek vojaĝ’, tamen  
nur la duan vi havos post kvaranten’.”  
Mi daŭrigis: “Silentu ho fiulo!  
Li estis ege amata piulo.  
Vojaĝ’ ne estas amuzo, sed drogo,  
Kaj dum tio, por li necesis zorgo.  
Mi deziris fari ceremonion,  
Ne gravis pagi ĉion aŭ nenion.”  
Diris al mi kronita sataneto:  
“Mi scias, ke mankas al vi kvieto.  
Esperantist’, kiu ĉiam vojaĝas,  
Nur serĉas tion, kio avantaĝas.  
Senatente al aĝaj proksimuloj,  
kaj iliaj bezonoj kaj postuloj.  
Kaj mono por vojaĝemulo gravas,  
Se vi plendas pri malriĉo, vi pravas.  
Ĉu vi ne aĉetis la plej malbonajn,  
por li manĝaĵojn kaj vestojn bezonajn?”  
Mi ekfuriozis el la tuta kor’,  
kun sentoj de fortaj angor’ kaj dolor’.  
Mi bone lavis la manojn per sapo,  
Ne plu restis ĝiaj krono kaj kapo.*

*Keyhan Sayadpour*



## Fabelo de Voltaire en Esperanto

# Blanko kaj Nigro

**NTDLR:** Antaŭ nelonge, kiam mi estis ordiganta la arkivon de IREA-Oficejo, mi trovis koverton datita oktobre 2006, enhavante leteron de kara Roland PLATTEAU en kiu li sendis fabelon de Voltaire tradukita al Esperanto. Mi ne scias la kialon ke tiam la fabelo ne aperis en la revuo, sed nun ni tion faras. Menciindas ke mi serĉis en la reto kaj trovis la fabelon en la paĝo de la tradukinto ĉe Ipernity. Krome mi kontaktis la tradukinto kaj petis lian permeson por reaperi ĝin en nia revuo, kie ĝi devus esti antaŭ ok jaroj. La suba averto estas klarigo de la tradukinto en sia paĝo.

**Tradukinto: Roland PLATTEAU**



**Averto:** Tiun tradukon de unu el la "malgrandaj" fabeloj de Voltair' mi ne enmetis en mian TTT-ejon (<http://r.platteau.free.fr/>), ĉar mi esperis publikigi ĝin en revuo. Mi provis sendi ĝin al la revuo Irana Esperantisto, ĉar ili estis antaŭ jam akceptintaj unu artikolon de mi ("Mistika ebrieco" <http://irea.oficejo.googlepages.com/10-a.pdf>) kaj mi pensis ke eble vidi kiel la irana mondo uzitis kiel fantazia temo en 18-jarcenta Francujo interesus la Iranan esperantistan publikon. (kaj ĉar ĉi rakonto ne estas kontraŭreligia, ĝi ne estus cenzurita en Irano!), sed ŝajnas ke ilia ret-adreso ne plu funkcias, ĉar la mesaĝoj estis montritaj kiel fiaskintaj, mi ankaŭ provis sendi la tekston per poŝto, sed ĉar mi ricevis nenan respondon, nek numeron de Irana Esperantisto (al kiu mi estis aboninta dum unu jaro antaŭe: tre bela revuo dulingva, persa kaj Esperanto, kun multaj fotoj) mi konjektas, ke ne nur ili ne publikigis ĝin, sed entute neniam ricevis ĝin. Do mi nur metas ĝin sur la reto, atende pli bone. Sed restas preskaŭ neniam da literaturaj revuoj en Esperantio, kaj tio ne estas sufiĉe ampleksa por fari libron.

**PREZENTO :**

Voltair' tute ne estimis siajn filozofiajn fabelojn ĝustavale: por li, kiel por liaj samtempuloj, la ununuraj «altaj» beletraj ĝenroj estas eposo kaj tragedio! Sed liajn tragediojn, je kiuj li kalkulis por iĝi senmorte fama, neniu plu legas! (kaj eĉ malpli lian eposon La Henriado) Kaj male lian tutan genion la posteularo trovas en la «etaj bagatelaĵoj», fabeloj, polemikaĵoj, filozofia vortaro, kiujn li subtaksis. La plej grandaj: Kandid (Simplanimulo), Zadig, kaj Senartifikulo jam estis esperantigitaj (de Eŭgeno Lanti: Eldonis SAT, 312 p.), tamen plumankas Mikromegas. Ĉi-sekve jen unu el liaj plej mallongaj fabeloj, ĝi ne estas tro satira, nek - io rara ĉe Voltaire! - kontraŭreligia, ne tro filozofia<sup>(1)</sup> (ĝi restas, kiel Zadigo, piruete senkonkluda) nur amuza, vigla aventuro, en la stilo de orientaj mirrakontoj, kiujn tiam malkovris kaj prifurorigis tiuepoke Francio. Tiu rakonto ne estas inter la plej tipikaj Voltair-aĵoj, sed oni bone rekonas lian lertan rapidan stilon, lian delikatan manieron «semi» la ironiaĵojn, kaj la pensindaĵojn, kvazaŭ nerimarkinte! (ekzercu vin, vi trovos multon por komenti) kaj ĝi temas, kiel la pli famaj kaj riĉaj Kandido (aŭ Simplanimulo) kaj Zadigo, pri unu al la temoj plej maltrankviligaj al Voltair': homa destino kaj "kial la malbono?" Ĝi ankaŭ montras la interesiĝon de la aŭtoro pri orientaj civilizoj, kaj pri Mazdeismo.

[<sup>(1)</sup> kvankam en la fino estas kia antaŭformo de la Ejnŝtejna relativeco!]\*

## Blanko kaj Nigro

Ĉiuj konas, en la Kandahara provinco historion de l'juna Rustano. Li estis solinfano de iu mirzao de l'lando: tio estas kvazaŭ oni dirus markizo inter ni, aŭ barono inter la germanoj. La mirzao lia patro havis al si sufiĉe kontentigan posedajon. Estis planite edzigi la junan Rustanon al fraŭlino, aŭ mirzaino liaspeca. Tion la du familioj arde deziris. Li estis faronta la konsolon de siaj gepatroj, igi sian edzinon feliĉa, kaj esti tia kune kun ŝi.

Sed malfeliĉsorte li estis vidinta la principon de Kaŝmiro en la Kabula foiro, kiu estas la plej ampleksa foiro en la tutmondo, kaj nekalkuleble pli alirita ol tiuj de Bassoro kaj Astrako; kaj jen kial la maljuna princo de Kaŝmiro estis veninta en la foiron kun sia filino.

Li estis perdinta la du plej rarajn pecojn de sia trezoro: unu estis diamanto dika kiel dikfingro, sur kiu lia filino estis eltranĉita, per arto, kiun la hindoj tiam posedis, kaj kiu perdiĝis poste; la alia estis ĵetlanko, kiu iras de si mem tien, kien oni deziras: kio ne estas afero tre eksterordinara inter ni, sed kio estis tia en Kaŝmiro.

Fakiro de Lia Princa Moŝto ŝtelis al li tiujn du juvelojn; li portis ilin al la principino; «Zorge gardu tiujn du aĵojn, li diris; via destino dependas de ĝi.» li tiam foriris, kaj ne plu estis revidita. La duko de Kaŝmiro, en malespero, decidiĝis iri por vidi, en la Kabula foiro, ĉu el ĉiuj la vendistoj, kiuj tien aliras elde la kvar anguloj de l'mondo, ne estus unu, kiu havus lian diamanton kaj lian armilon. Li kondukadis sian filinon kune kun si dum ĉiuj siaj vojaĝoj. Ŝi kunportis sian diamanton zorge enfermita en ŝia zono; sed koncerne la ĵetlancon, kiun ŝi ne povis tion facile kaŝi, ŝi tenis ĝin zorge enŝlosita en Kaŝmiro en ŝia granda kestego el Ĉinio.

Rustano kaj ŝi intervidis sin en Kabulo; ili amis sin per tuta la simpleco iliaaĝa, kaj tuta la korsento ilialanda. La principino, kiel garantiaĵon de ŝia amo, donacis al li sian diamanton, kaj Rustano ŝin promesis dum foriro, ke li vizitos ŝin sekrete en Kaŝmiron.

La juna mirzao havis du favoritulojn, kiuj

utilis al li kiel sekretarioj, rajdhelpantoj, tablostrumistoj kaj ĉambroservistoj. Unu nomiĝis Topazo: li estis bela, eleganta, blanka kia ĉerkesino, milda kaj servema kia armeno, saĝa kia gebro\*. La alia nomiĝis Ebono: li estis nigrulo plejĉarma, pli kompleza pli diligenta ol Topazo, kaj kiu taksis nenion malfacila. Li konigis al ili la projekton de lia vojaĝo. Topazo provis lin deadmoni de tio, kun la singarda diligento de servisto, kiu ne volas lin malplaĉi; li montradis al li ĉion, kion li endanĝerigis. Kial lasi du familiojn en la malespero? kial enmeti tranĉilon en la koron de liaj gepatroj? Li ŝancelis Rustanon; sed Ebono refirmigis lin kaj forvaporigis ĉiujn liaj skrupulojn.

Mono mankis al la junulo por tiom longa vojaĝo. La saĝa Topazo ne estus pruntedoniginta al li da. Ebono provizi pri tio. Li kaŝe prenis la diamanton de sia mastro, farigis de ĝi falsitaĵon tute similaspekta, kiun li remetis en ĝian lokon, kaj donis la malfalsan kiel grantiaĵon al armeno, kontraŭ kelkaj miloj da rupioj.

Kiam la markizo ekhavis siajn rupiojn, ĉio estis preta por la foriro. Oni ŝarĝis elefanton per lia pakaĵoj; oni surĉevaliĝis; Topazo diris al sia mastro: «Mi prenis por mi la liberecon fari al vi kontraŭargumentojn pri via entreprenitaĵo; sed post esti kontraŭargumentinta, endas obei; mi estas via, mi amas vin, mi sekvos vin ĝis la fino de l'mondo; sed ni konsultu survoje la orakolon, kiu troviĝas je du parasaĵoj\* disde ĉitie.» Rustano konsentis pri tio. La orakolo respondis: «se vi iros al oriento, vi estos al okcidento» Rustano komprenis nenion pri tiu respondo. Topazo asertis, ke ĝi entenas nenion bonan. Ebono, ĉiam kompleza, persvadis lin, ke ĝi estas tre favora..

Estis alia plia orakolo en Kabulo; ili aliris. La Kabula orakolo repondis tiujvorte: «Se vi posedos, vi ne posedos, se vi estos venkinto, vi ne venkos; se vi estos Rustano vi ne estos lin.» Tiu orakolo aperis eĉ pli nekomprenebla ol la alia. «Gardu vin, diris Topazo – ne timu» diris Ebono; kaj tiu ministro, kiel oni povas konjekti, ĉiam pravis en la okuloj de sia mastro, kies pasion kaj esperon li kuraĝigis.

Elirinte de Kabulo, oni piediris tra vasta arbaro, oni sidiĝis sur herbo por manĝi, oni lasis la

ĉevalojn sin paŝti. Oni pretigis sin malŝarĝi la elefanton, kiu portis la mangaĵon kaj la manĝilaron, kiam oni ekrimarkis, ke Topazo kaj Ebono ne plu estis kun la malgranda karavano. Vokitas al ili; la arbaron oni sonorigas per la nomoj Ebono kaj Topazo. La servistoj serĉas ilin ĉien, kaj plenigas la arbaron per siaj krioj; ili revenas nenion vidintaj, ne responditaj. «Nura aĵo kiun ni renkontis estis vulturo, kiu interbatalis kun aglo, kaj kiu deŝiris al ĝi la plumojn.» Rakonto pri tiu lukto instigis la scivolemon de Rustano; li iris piede al la loko, li rimarkis nek vulturon, nek aglon; sed li vidis sian elefanton, plu ŝarĝita de lia pakaĵo, kiu estis atakita de peza rinocero. Unu batis per la korno, la alia per la rostro. La rinocero ekvidinte Rustanon rezignis la lukton; oni revenkondukis lian elefanton, sed oni ne plu trovis la ĉevalojn. «Okazas ja strangaj aferoj en la arbaroj kiam oni vojaĝas!» ekkris Rustano. La servistoj estis ĉagrenigitaj, kaj la mastro afliktita pro esti perdinta samtempe siajn ĉevalojn, sian karan nigrulon, kaj la saĝan Topazon, je kiu li sentis ĉiam amikecon, kvankam tiu neniam estis liaopinia.

Li estis konsoliĝanta per la espero baldaŭ troviĝi ĉepiede de la bela princino de Kaŝmiro, kiam li renkontis grandan striitan azenon, kiun kamparanaĉo, fortega kaj timiga, draŝadis per bastono. Nenio pli belas, pli raras, pli kurlertas, ol azenoj de tiu specio. Tiu-ĉi estis respondanta la ripetitajn frapojn de l' krudulo per kalcitroj, kiuj povus elradikigi kverkon. La juna mirzao elektis, kio pravas, la flankon de l'azeno, kiu estis beleta kreitaĵo. La kampulo forfuĝis dirante la azenon: «Vi tion pagos al mi.» La azeno dankis siaidiome sian liberiganton, alproksimiĝis, sin lasis karesi, kaj karesis. Rustano ekrajdas ĝin post esti tagmanĝinta, kaj ekiras la vojon al Kaŝmiro kun liaj servistoj, unuj piede, aliaj rajdantaj la elefanton.

Tuj post kiam li sidis sur sia azeno, jen la besto turnas sin al Kabulo, anstataŭ sekvi la vojon al Kaŝmiro. Ĝia mastro ja vane turnas la bridon, faras ekskuojn, premas per la genuoj, puŝas sur la spronoj, malstreĉas la bridon, tiras ĝin al si, vipas dekstre, maldekstre, la obstina besto ĉiam kuradas al Kabulo.

Rustano ŝvitadis, baraktadis, malesperadis, kiam li renkontis kamelonegociston, kiu diris al li : Mastra Moŝto vi ja havas ĉi-tie azenon lertegan , kiu kondukas vin al tie, kie vi ne volas iri; se vi bonvolus lasi ĝin al mi, al vi mi donus kvar el miaj kameloj laŭ via elekto.» Rustano dankis la Providencon pro esti haviginta al li tiom bonan negocon. «Topazo tre malpravus, li diris, dirante ke mia vojaĝo estos malfeliĉa.» Li surdorsiĝas sur la plej belan kamelon, la tri aliaj sekvas: li reatingas sian karavanon, kaj vidas sin survoje al sia feliĉo.

Apenaŭ irinte kvar parasanojn jen li haltigatas de profunda torento, larĝa, impeta, kiu pelis kun si rokojn superblankitaj pro ŝaŭmo. La du bordoj estis du krutaĵoj teruraj, kiuj blindigis vidpovon, kaj frostigis kuraĝon; nenia rimedo transiri, nenia iri ĉu dekstren ĉu maldekstren. «Mi ektimas, diris Rustano, ke Topazo pravus mallaŭdante mian vojaĝon, kaj mi tre malpravus ĝin entrepreni; kaj se nur li estus ĉi-tie, li povus doni al mi kelkajn bonajn konsilojn. Se mi havus Ebonon, li min konsolus, kaj li elpensus elturniĝojn; sed ĉio al mi mankas.» Lia konsterniĝo estis pliigita pro malespero de lia akompanantaro: l'nokto tute nigris, oni trapasis ĝin veante. Finfine laceco kaj malviglo dormigis la amantan migranton. Li vekigis ĉe matenruĝo, kaj vidas belan ponton el marmoro starigita super la torento de bordo al l'alia. Ek estiĝis krioj, kriadoj el miro kaj ĝojo. «Ĉu eblas? ĉu sonĝo? kioma mirindaĵo! sorĉaĵo! ĉu ni aŭdacu trapasi?» La tuta rondo surgenuiĝis, restariĝis, iris al pont', kisis teron, rigardis ĉielon, disĵetis manojn, metis piedon tremante, iris, returnis, estis en ravo; kaj Rustano diris: Jen ĉifoje favoras al mi ĉielo: Topazo ne sciis kion li diris; orakoloj estis favoraj; Ebono pravus; sed kial do li ne estas ĉi-tie?»

Apenaŭ la irantaro estis trans de l'torento, ke jen la ponto enfalas en l'akvon kun bruego teruriga. «Des pli bone! des pli bone! ekkris Rustano; Laŭadata estu Dio! Benatu ĉielo! ĝi volas, ke mi ne reiru en mian landon, kie mi estus nur simpla nobeleta; ĝi volas, ke mi edziĝu je tio, kion mi amas. Mi estos princo de Kaŝmiro; kaj tiele posedante mian amatinon, mi ne posedos mian etan makizejon en Kandaharo. Mi estos

Rustano, kaj ne estos lin, pro tio ke mi iĝos grandan princon: jen granda parto de la orakolo klarigita nete miafavore, la cetero klarigita tiel same; mi tro feliĉas! Sed kial ja Ebono ne staras apud mi? Mi bedaŭras lin milfoje pli ol Topazon.”

Li antaŭeniris plu kelkajn parasanojn kun plej granda ĝojego; sed fine de l' tago, remparzono el montoj pli krutaj ol fortikaĵaj muregoj, kaj pli altaj ol estus Babela turo, se ĝi estus finkonstruita, plene baris la ektimigitan karavanon.

Ĉiuj ekkriis: ”Dio deziras, ke ni pereu ĉi-tie! Li rompita la ponton nur por senigi nin je ĉia returnespero; li starigis la monton nur por senigi nin je ĉia rimedo pluri. Ho Rustano! ho malbonsorta markizo! neniam vidos ni Kaŝmiron, neniam ni rehejmiĝos en la teron de Kandaharo.”

Plej akra doloro, plej premege malviglo postvenis en l' animo de Rustano la malmoderan ĝojon, kiun li estis sentinta, la esperojn per kiuj li ebriiĝis. For estis li de interpreti la profetaĵojn siaavantaĝe. «Ho ĉiel'! ho patra Di'! kial do mi estu perdinta mian amikon Topazo!»

Dummomente, ke li estis eldiranta tiujn parolojn veante per vastaj anheloj, kaj verŝante plorojn meze de siaj senesperigitaj sekvantoj, jen la montobazo malfermiĝas, longa volbita galerio, prilumita per centoj da torĉoj, montriĝas je la mirbatitaj okuloj; kaj ekkrias Rustano, kaj ekĝenuiĝas lia servistaro, kaj ekfalas ili surdorse pro mirego, kaj ekkrias «miraklo!» kaj diras: «Dia favorito de Viŝnuo, bonamata de Bramo estas Rustano; li estos la mastro de l' mondo.» Rustano kredis pri tio, li estis for de si, leviĝinta super si mem. «Ha Ebono, mia kara Ebono! kie vi estas? vi povu esti vidanto de ĉiuj tiuj mirindaĵoj! kial mi perdis vin? bela princino de Kaŝmiro, kiam revidos mi viajn ĉarmaĵojn?» Li antaŭeniras kun sia servistaro, sia elefanto, siaj kameloj, sub la volbo de l' monto, fine de kiu li eniras herbejon emajlitan de floroj kaj borderita de rojoj; kaj fine de l' herbej' ekestas arb-aleoj vicigitaj ĝis vidofino; kaj fine de tiuj aleoj rivero, laŭlonge de kiu kuŝas miloj da plezurloĝejoj kun ĝuigaj ĝardenoj. Li aŭdas de ĉie voĉhorojn kaj muzikistajn rondojn; li vidadas dancojn; li haste transiras unu el la pontoj; li demandas al

la unua renkontito, kiu estas tiu bela lando?

La viro al kiu li estis sin direktita respondis: «Vi estas en la provinco Kaŝmiro; vi vidas la loĝantojn en ĝojoj kaj plezur'; ni solenas pro nia bela princino, kiu estas edziniĝonta kun la grandsinjoro Barbabu', al kiu ŝia patro ŝin promesis; Daŭrigu Dio ilian feliĉegon!» Je tiuj frazoj Rustano falas, sveninta, kaj la kaŝmira nobelo kredis, ke li estis ema je epilepsio; li ordonas, ke li estu portita en lian domon, kie li restis longtempe senkonscia. Oni venigis la du plej lertajn kuracistojn de l'kanton; ili palpis la pulson de l' malsanulo, kiu iom rekonsciiĝinta, eligis singultojn, ruligis la okulojn, kaj pofoje kriis: «Topazo, Topazo, vi vere pravis!»

Unu el la du kuracistoj diris al la kaŝmira nobelo: «Mi aŭdas je lia elparolo, ke li estas junulo el Kandaharo, al kiu la aero de ĉi lando ne sanigas; necesas reirigi lin en la propran landon; mi vidas je liaj okuloj, ke li iĝis freneza; lin konfidu al mi, mi rekondukos lin en sian patrujon, kaj resanigos lin.» La alia kuracisto certigis, ke nur el ĉargreno li malsanis, ke endas lin konduki al la edziniĝfesto de la princino, kaj dancigi lin. Dum ili kunsultiĝis la malsanulo regajnis fortojn; la du kuracistoj estis forsenditaj, kaj Rustano restis vid-al-vide kun sia gastiganto. «Sinjoro, li diris al li, mi pardonpetas pro esti sveninta kontraŭ vi, mi scias, ke tio ne estas ĝentila; Mi petegas vin akcepti mian elefanton kiel dankon pro la bonagoj per kiuj vi honoris al mi.» Li poste rakontadis al li ĉiujn siajn aventurojn, gardante disde eldiri la celon de sia vojaĝo. «Sed je la nomo de Viŝnuo kaj Bramo, li diris, sciigu al mi kiu estas tiu feliĉa Barbabu', kiu edzinigas la princinon de Kaŝmiro; kial ŝia patro elektis lin kiel bofilon, kaj kial la princino konsentis ke li estos ŝia edzo. – Sinjoro, lin respondis la Kaŝmirano, la princino tute ne konsentis je Barbabu'; male, ŝi estas en ploro, dum la tuta provinco solenas kun ĝojo ŝian edzinigon; ŝi enfermis ŝin en la turo de sia palaco; ŝi malvolas vidi ion ajn de la ĝojelmontroj, kiujn oni faras pro ŝi.» Rustano, aŭdante tiujn parolojn, sentis sin renaskiĝi; koloroj de l' vizaĝo, kiujn sufero estis velkiginta, refloris. «Bonvolu diri al mi, mi petas, li pludir, kial la princo de Kaŝmiro persistas je doni sian filinon

al ia Barbabu', pri kiu ŝi ne volas.

– Jen la faktoj, respondis la kaŝmirano. Ĉu vi scias, ke nia honorinda princo estis perdinta dikan diamanton kaj ĵetlancon, kiuj estis al li tre karaj? – Ha! mi tion scias ege bone, diris Rustano. – Do lernu, diris la gastiganto, ke nia princo, en malespero pro manko de novaĵo pri siaj du juveloj, post esti ili serĉigitaj longtempe tra la tuta tero, promesis sian filinon al kiu ajn realportos unu aŭ alian el ili. Alvenis iu sinjoro Barbabu', kiu estis provizita de l' diamanto, kaj li edziĝos morgaŭ kun la princino.»

Rustano paliĝis, balbutis gentilaĵon, petis de sia gastiganto forirpermeson, kaj kuris sur sia dromedaro ĝis la ĉefurbo, kie estis okazonta la solenaĵo. Li alvenas en la palacon de l' princo; diras, ke li havas gravajn aferojn por komuniki al li; li petas aŭdiencon; estas respondita, ke l' princo okupatas pri pretigadoj de l' edziĝfesto: Pri tio precize mi volas lin paroli.» Li insistas tiom, ke fine li estas enkondukata. «Via Princa Moŝto, li diris, Dio kronu ĉiujn viajn tagojn per gloro kaj brilo! Via estonta bofilo estas fripono. – Kiel, fripono! Kion vi aŭdacas diri? Ĉu tiel oni parolas al duko de Kaŝmiro pri la onta bofilo, kiun li elektis? – Jes ja, fripono, reparolis Rustano; kaj por tion pruvi al via Princa Moŝto, jen estas tio via diamanto, kiun mi alportas al vi.»

La duko, tre mirigita, komparis la du diamantojn unu flanke de la alia; kaj ĉar li ne tro kompetentis pri tio, li ne kapablis eldiri pri, kiu estis la malfalsa. «Jen du diamantoj, li diris, kaj mi havas nur unu filinon; jen mi en treega embaraso!» Li venigis Barbabuon, kaj demandis al li ĉu li ne estus lin trompita. Barbabuo ĵuris, ke li estis aĉetinta sian diamanton de armeno; la alia ne diris de kiu li akiris sian diamanton, sed li proponis rimedon por elturniĝi, tio estis, ke bonvolu Lia Princa Moŝto bataligi lin tuj kontraŭ lia konkuranto. «Ne sufiĉas, ke via bofilo donu diamanton, li diris; li ankaŭ devas doni pruvon pri kuraĝo: ĉu vi ne opinias inda, ke tiu, kiu mortigos la alian, edzinigos la princinon? – Tre inda, respondis la princo, tio estos ja bela spektaklo al la kortego; rapide interbatalu vi du: la venkinto prenos la armilojn de la venkito, laŭ la kutimo kaŝmira, kaj li edziĝos al mia filino.»

La du konkurantoj tuj deŝtuparas al korto. Estis sur la ŝtuparo pigo kaj korvo. La korvo blekis: «Interbatalu, interbatalu»; la pigo: «Ne interbatalu.» Tio ridigis la princon; la du batalontoj apenaŭ atentis: ili ekbatalas; ĉiuj korteganoj encirkliĝas ĉirkaŭ ilin. La princino sin tenante plu enfermita en sia turo, ne volis spekti tiun spektaklon; ŝi estis ja for disde konjekti, ke ŝia amanto estas en Kaŝmiro, kaj ŝi sentis tioman abomenon pri Barbabuo, ke ŝi volis nenion vidi. La batalo disvolviĝis tute glate; Barbabu' estis plene mortigata, kaj la popolo ĝuis tion, ĉar li estis malbela, kaj Rustano ĉarme bela: preskaŭ ĉiam decidigas la publikan favoron tiaĵoj.

La venkinto surmetis la maŝkirason, la ŝultrotukon, kaj la kapŝirmilon de la venkito, kaj venis, sekvita de la tuta kortego, kun fanfarosono, sin elmontri sub la fenestroj de sia amatino. Ĉiuj kriadis: «Bela princino, venu kaj vidu vian belan edzon, kiu mortigis sian fimalbelan konkuranton»; ŝiaj virinoj ripetis tiujn parolojn. Malbonsorte la princino elmetis la kapon ĉe la fenestro, kaj vidante la kirason de viro, kiun ŝi abomenis, ŝi kuris kiel malesperiĝinto al sia kesteĝo el Ĉinio, kaj ĵetis la fatalan ĵetlancon, kiu iris trabori ŝian karan Rustanon je la malsolida punkto de l' kiraso; li eligis kriegon, kaj je tiu krio la princino rekonis kvazaŭ la voĉon de sia malfeliĉa amato.

Ŝi malsupreniras hartaŭzita, morton en la okuloj, kaj en koro. Rustano estis jam falinta plensanga en brakojn de ŝia patro. Ŝi ekvidas lin: ho tempero! ho vidaĵo! ho rekono kies neesprimeblas nek doloro, nek korsento, nek abomeno! Ŝi ĵetas sin sur lin, ŝi kisadas lin: «Vi ricevas, ŝi diris lin, la unuajn kaj lastajn kisojn de via amatino kaj murdistino.» Ŝi eltiras la pinton de la vundo, puŝas ĝin en sian koron, kaj mortas sur la amanto, kiun ŝi amegas. La patro terurita, senkonsila, preta je morti kiel ŝi, vane klopodas reveki ŝin al vivo; ŝi ne estis plu; li malbenas tiun fatalan mortigilon, rompas ĝin en pecojn, forĵetas siajn du diamantojn pereigajn; kaj dum oni preparigas la funabradon de lia filino anstataŭ ties edziniĝfesto, li transportigas en sian palacon sangkovritan Rustanon, en kiu ankoraŭ restis ero da vivo.

Oni portas lin en liton. Unuan aĵon, kiun li vidas ambaŭflanke de tiu mortolito, estas Topazo kaj Ebono. Lia ekmiro redonis al li iom da forto. “Ha! Kruelej, li diris, kial do vi forlasis min? eble la princino plu vivus, se vi estus kun la malbonsorta Rustano – Mi ne forlasis vin eĉ momenton diris Topazo. – Mi konstante estis apud vi, diris Ebono. – Ha! kion vi diras? kial ofendi miajn lastasjn temperojn? respondis Rustano per velkiĝanta voĉo. – Vi povas kredi min pri tio, diris Topazo; vi scias, ke neniam mi aprobis tiun fatalan vojaĝon kies mi antaŭvidis terurigajn sekvojn. Estis mi la aglo, kiu batalis kontraŭ la vulturo, kaj kiun ĝi senplumigis; mi estis la elefanto, kiu forportis la pakaĵon por trudi vin returni en vian patrujon; mi estis la striita azeno, kiu vin rekondukis spite al vi ĉe via patro; perdigis mi viajn ĉevalojn; formis mi la torenton, kiu malhelpis al vi transpasi; starigis mi la montaron, kiu fermis al vi vojon tiom fatalan; estis mi la kuracisto, kiu konsilis al vi la nasklandan aeron; mi estis la pigo, kiu kriis al vi ke vi ne batalu. – Kaj mi, Ebono diris, mi estis la vulturo, kiu senplumigis la aglon; la rinocero, kiu batis per cent kormofrapoj la elefanton, la kamparanaĉo, kiu draŝadis la striitan azenon; la negocisto, kiu donis al vi kamelojn, ke vi kuru al via perejo; konstruis mi la ponton sur kiu vi trapasis; estas mi la kuracisto, kiu instigis vin piediri; la korvo, kiu kriis vin batali.

– Ve! rememoru la orakolojn, Topazo diris: se vi iros al oriento, vi estos al okcidento. – Jes, diris Ebono, ĉi tie entombigitas la mortintintoj vizaĝon direktita al okcidento: la orakolo estas klara, kial vi ne komprenis ĝin? Vi posedis, kaj vi ne posedis: ĉar vi havis diamanton, sed li estis falsa, kaj pri tio vi sciis nenion. Vi estas venkinto, kaj vi mortas; vi estas Rustano, kaj vi ĉesas esti lin: ĉio plenumiĝis.»

Dum li tiel parolis, kvar blankaj flugiloj ekkovris la korpon de Topazo, kaj kvar nigraj flugiloj tiun de Ebono. «Kion mi vidas?» ekkriis Rustano. Topazo kaj Ebono respondis ĥore: «Vi vidas viajn du feojn. – Hej! Sinjoroj, diris al ili la malfeliĉa Rustano, kial do ŝovas vi vian nazon en fremdan vazon? kaj kial do du genioj por unu mizera homo? – Tia estas la leĝo, Topazo diris; ĉiu homo havas siajn du feojn, Diris tion

